


# S@luton!

La Ĵurnaleto de la Junularo Esperantista Brita

SOMERO 2006 www.novajeb.org.uk

## JEBanoj ĉe la Brita Kongreso de Esperanto!





Ĉe la akceptejo en la hotelo Green Gables, jam multaj kongresanoj interbabiladis kaj la esperantista atmosfero ja komenciĝis. Estis bonega okazaĵo por fine renkonti homojn, kun kiuj mi antaŭe komunikadis, inkluzive miaj kurso-instruistoj -*Dankon pro la trinkaĵo!* Ankaŭ estis interesinde povi parigi nomojn al vizaĝoj de kelkaj el tiuj konataj Esperantistoj, pri kiuj oni ĉiam aŭdas. Post la komuna bufado, la junuloj kuniĝis kaj, antaŭ ol ni enlitiĝis, Petra klopodis instrui al Marcos kiel oni dancu ĝuste al Dolchamar – sensukcese. La sekvinta mateno, nur du el ni pretiĝis je la horo por ĉeestis la unuan prelegon, lasante la alian ronkante. Kaj eĉ kiam ni revenis ŝi ankoraŭ ne translokiĝis, sed dankinde, el ie ŝi trovis la energion por krii al amikoj, kiuj ne vidis unu la alian dum iom da tempo, kaj aliaj, kiuj rapide amikiĝis. Tio, la Esperanstistara maniero, ke ĉiuj bonveniĝas kaj intermiksiĝas. Marcos menciis ke li ŝatas kuiri, do por feliĉigi lin, ni ĉiuj lasis la preparadon de la manĝaĵo al li, dum ni parolis kaj ŝercis en la alia ĉambro de la apartamento.



Je la vespero, la junuloj promenis serĉi la urbocentron, sed ni rezigniĝis kaj iris al restoracio anstataŭe. Ni revenis al la hotelo por rigardi la interesan teatraĵon de Paul Gubbins, prezentata de la Verda Rano, kaj poste ludis bilardon ĝis malfrue.

Kvankam laca, ĉiuj ellitiĝis por iri al la EAB jarkunsido, verŝajne la plej grava parto de la semajnfino. Tie oni aŭdis pri ĉio, kio okazis dum la jaro kaj pluraj homoj forte transdonis siajn opiniojn pri kiel la asocio progresu. La diskutado estis sekvata per elekto de nova komitato. Nia propra Tom Shorney estis unu el la voĉdonkontrolistoj.

> *Ĉu vi ankoraŭ ne membriĝis al **JEB**? Trovu la aliĝilon ĉe nia retpaĝaro, [www.novajeb.org.uk](http://www.novajeb.org.uk), kaj membriĝu senpage!*

La membroj de JEB havis sian propran kunsidon kaj faris decidojn pri diversaj aferoj. Detaloj pri la jarkunsido troveblas ĉe la 5-a paĝo de la ĵurnaleto. Estis multe da entuziasmo kaj ideoj kaj ni vere celas daŭrigi ĉi-tiun nivelon de intereso longtempe. Ni finfine trovis Scarborough, kiu estas kiel irlanda fiŝvilaĝo kun la *Blackpool*-iluminaĵoj. La fina nokto estis tempo de iom da rilakso kaj babilado en la baro por ĉiuj la esperantistoj, la junuloj kaj la pli-aĝaj kune. Espereble je la venonta jaro eĉ pli da Jebanoj partoprenos!



*Daniel White*

## Nova Komitato

Petra Fantom - Prezidanto

Rolf Fantom - Sekretario

Mikeo Seaton - Kasisto

Hannah Tellier - Komitatano

Tom Shorney - Komitatano

Daniel White - Komitatano

*Ni adiaŭas* Tim Owen*, ekskomitatano, kiu forlasis la komitaton laŭvole. Ni dankas al li pro lia laboro dum la pasintaj jaroj, kaj certe aŭdos el li estonte!*

## REDAKTORA NOTO

Saluton al ĉiuj! Bonvenon al la unua eldono de ***S@luton***. Mi tre ekscitiĝas pri ĉi-tiu ĵurnaleto; dum longa tempo mankas al junaj britaj Esperantistoj informaĵoj pri Esperantaj junularaj eventoj.

Estinte, nia ĵurnaleto aperis neregule, sed mi volas ŝanĝi tion. Ni penos eldoni *S@luton* kvaronjare, do ni bezonos viajn artikolojn!

Mi esperas ke nia ĵurnaleto ĝisdatigos vin pri Esperantaĵoj en Britio, kaj ke ĝi inspirigos vin ankaŭ partopreni en eventoj, pri kiuj vi sentiĝu bonvenata raporti por ni!

Amike,

Tom Shorney




La Lernejo de *Sir Thomas Rich* en Gloucester, sudokcidenta Anglio, havas Esperanto-Klubon ekde kvin jaroj. Septembre 2005 komenciĝis projekto "Comenius", en kiu lernejoj el diversaj eŭropaj landoj interŝanĝas informaĵojn pri lernantoj, kulturoj, tradicioj, kaj multaj aliaj aferoj, inter ĉi-tiu brita lernejo, kaj du lernejoj el Bulgario kaj Italio.

La unua renkontiĝo de la partoprenantaj lernejoj okazis en Polski Trambeŝ, Bulgario, novembre 2005, kaj la dua en la itala lernejo en Modena, Italio, aprile 2006. La temo de la dua renkontiĝo estis "Kulturaj Tradicioj kaj Heredaĵoj de mia Lando", kaj ĉiuj lernejoj prezentis prezentadojn. La brita lernejo faris filmeton por prezenti en Italio.



La lernejoj ankaŭ havas komunajn konkursojn. Ekzemple, por la dua renkontiĝo, lernantoj en ĉiuj lernejoj faris desegnaĵojn, kiuj temis pri "Mia Malproksima Amiko".

Ĉi-tiu projekto nomiĝas "AKEL-2" (*Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj*), ĉar ĝi estas la dua Comenius-projekto, kiu uzas la internacian lingvon por komuniki. Baldaŭ aliĝos tri aliaj lernejoj el Hispanio, Francio, kaj Litovio al la projekto. Delegantoj el la partneraj lernejoj alvenos en Gloucester ĉi-septembre.

*Tom Shorney*

*Ĉu vi partoprenis Esperanto-eventon, pri kiu vi volas skribi artikolon, aŭ simple volas verki pri io ajn (angle aŭ esperante)?*

*Ni feliĉe ricevus viajn artikolojn, poemojn, muzik-recenzojn, ktp.*

*Bonvolu sendi vian materialon al*

***saluton@novajeb.org.uk***

*plej laste la 3-a septembro 2006 por inkluzivi en la venonta numero de S@luton!*

# Fiŝa Semajnfino

## *Bulonjo-ĉe-Maro, Francio, 30a Marto-2a Aprilo 2006*



Kiel al mi, unue la nomo de la evento verŝajne ŝajnas iomete stranga. La ideo por la evento, organizita per Espéranto-Jeunes, la franca junulara fako, venas el la franca kutimo, kiun oni faras je la 1a aprilo. Simila al nia 'Aprila Stultulo', sed tie por la ŝerco oni metas paperan fiŝon sur la dorson sen ke tiu rimarku. Mi ne tute komprenis la kialon por la fiŝo, sed aspektis sufiĉe amuza. Krome, la urbo de



Bulonjo-ĉe-Maro, tre konata kun la esperantistaro kiel la loko de la unua Universala Kongreso, estas ankaŭ la plej granda fiŝhaveno en Francio.

Du junuloj el Britio ĉeestis, mi kaj Alex Watson, kaj por ambaŭ, ĝi estis nia unua internacia evento. Estis ĉirkaŭ 20 Esperantistoj, kiuj venis el ses landoj, io tute mirinda kaj kiu montras la utilecon de Esperanto, ĉar sen ĝi ni ne havintus komunan lingvon por komunikadi. Estis utile povi informiĝi pri la agadoj de la pli grandaj junularaj asocioj en Eŭropo. Kiam ni alvenis, fiŝa plado estis jam preparita. Laŭ la temo de la semajfino, ĉiuj manĝoj enhavis fiŝon aŭ marproduktojn. Vespere ni ludis kaj interbabilis antaŭ enlitiĝi. En la dormĉambro estis vicoj da multaj etaj litoj kaj ŝajnis



ke mi estis en iu sceno de Neĝulino kaj la sep nanoj. La plej bona afero estis ke dum la nokto oni aŭdis iujn diskutante mallaŭte, ĉiu la parolado estis tute Esperante.

Dankinde, por la matenmanĝo ne estis tro da fiŝo kaj almenaŭ la teo plaĉis. Ni eliris frue por promenado ĉe la plaĝo. Estis agrable esti aliflanke de la Maniko kaj mi ŝatintus povi vidi nian landon en la distanco sed kvankam la tago estis hela, ne eblis. Iuj serĉis interesaĵojn en la sablo kaj aliaj klopodis trovi sufiĉe grandajn mitulojn por manĝi.

Reveninte al la loĝejo, kaj manĝinte pli da fiŝo, oni faris la tradician francan aferon kun la paperajn fiŝojn. Bonegas engaĝiĝi en la kutimoj de aliaj landoj.

Poste ni veturis al akvario. Ni ŝoforis tra la kamparo kaj la urbo kun grandega flago supere. Multe da homoj nin rigardis konfuzate. Eble ili ne komprenis,



kiun ĝi signifis sed estis ekscite povi demonstri tian subtenon por la internacia lingvo. Dum pluraj horoj ni vidis ĉian markreaĵon, eĉ krokodilon – sed, laŭ atendo, li ne parolis Esperanton.

Alex kaj mi ja ĝuegis ĉiu parto de la semajnfino kaj mi tut-certe estis malkontena forvojaĝi. Dankon al ĉiuj kiuj aranĝis, veturis kaj kuiris. Bonega ideo por renkontiĝo!

*Daniel White*



# Renkontu... Petra Fantom

Prezidanto de JEB

***Kiel vi Esperantistiĝis?***

Esperantiĝi, al mi, povus signifi du aferojn. Unue, eklerni kaj paroli la lingvon, kaj due, ekuzi la lingvon por kialoj kiuj estas konsistaj kun la originala ideologio de Esperanto. La unua speco de mia Esperantiĝo okazis ne pro mia volo, sed pro la volo de miaj gepatroj; mi estas denaska Esperanto-parolanto. La dua okazis iam dum mia dekkvina jaro en la mondo, kiam, post jaroj da infanaj kongresoj al kiuj miaj gepatroj sendis min, mi mem decidis iri al la IJK en Rjeka, Kroatio, por renkonti junulojn de aliaj landoj kaj kulturoj.

***Kion vi faras kiel Prezidantino?***

Mia persona celo kiel prezidantino estas ebligi al Britaj junuloj kiuj parolas, aŭ volas paroli, Esperanton uzi la lingvon por renkonti aliajn Esperanto-parolantojn tra la mondo. Por fari tion, mi subtenas la starigon de reta forumo por JEBanoj, kaj la starigon de karavano al la IS (*Internacia Seminario*), la ĉiu-jara novjara junulara kunveno en Germanio.

***Ĉu vi ofte ĉeestas esperantajn eventojn?***

Jes. Pasintjare mi ĉeestis la IS-on, novjare en Germanio kaj KEF-on (Kultura Esperanto Festivalo), somere en Finnlando. Mi ŝatintus ĉeesti plurajn aliajn Esperanto-eventojn tra la mondo.

***Kio estas via favorata esperanta vorto?***

"Aliĝi". Kiam tiu vorto estas tradukita al la Angla, ĝi ne vere signifas ion ajn speciala, sed ĉiufoje kiam mi uzas ĝin Esperante, mi ĝojas, ĉar signifas ke mi iros ien kaj renkontos homojn el diversaj kulturoj, kiuj havas diversajn pensmanierojn.

***Kio estas via profesio?***

Momente mi veturigas ŝarĝaŭtojn. Tamen ne por longe. Iam baldaŭ mi iros al Nov-Zelando por labori en la montaro, esperebIe gvidante promenojn sur la glaciajn regionojn de tiuj montoj. Kaj kiam mi enuiĝos pri tio (ĉu tio eblas aŭ ne, mi ne certas) mi revenos al Britio kaj aliĝos al la polico.

***Ĉu vi havas hobiojn?***

Plurajn. Krom eksteraj agadoj (promenado, rok-grimpado, vel-boatado...) mi ŝatas fari sportojn, ekzemple, TaeKwonDo, rugbeo, kurado. Kaj Kiam mi tro pigras por fari aktivajn hobiojn, mi ŝatas muzikumi en mia bando Kadakar, aŭ sole kun mia violonĉelo. Alikaze mi legas amuzajn aŭ fantaziajn librojn.

***Ĉu vi parolas aliajn lingvojn?***

Mi ne ŝajnigos ke mi estas lingvisto. Mi parolas Esperanton kaj la anglan flue. Mi ŝatus pensi ke mi povus travivi vizitojn al Hispanio kaj Germanio sen uzi la anglan, sed eble mi iom sonĝas kiam mi pensas tion.

***Ĉu vi havas mesaĝon por la JEBanoj?***

Se vi iam ajn havos ŝancon, iru al internacia junulara evento en Esperantio. Ne gravas kiu evento, aŭ kie. Simple ke vi iru, uzu la lingvon, kaj renkontu homojn.

*Intervjuanto: Tom Shorney*

Renkontu...? *Kiun vi volas ke ni intervjuu? Ĉu komitatano, famkonata brita Esperantisto, aŭ iu alia? Kiujn demandojn vi volas ke ni demandu? Sendu viajn sugestojn, demandojn, kaj komentojn al saluton@novajeb.org.uk*



# *Resumo de la JEB-Jarkunsido ĉe la Brita Kongreso de Esperanto*

Nia oficiala jarkunsido okazis post la jarkunsido de EAB, kaj la nia estis multe pli trankvila ol la alia! Kiel estis kutimo dum la kongreso, la JEBanoj renkontiĝis en la baro de la *"Green Gables Hotel"* kaj ekdiskutis pri la freŝdata aktiveco, kiu troveblis ĉe la JEB-disuklisto (interrete).

Tiam okazis elekto de ĉiuj malnovaj komitatanoj kaj du novaj komitatanoj: Tom Shorney kaj Daniel White. Ĉi-tiuj JEBanoj parolis pri siaj ideoj kaj planoj por la retpaĝaro kaj la ĵurnaleto, kiuj, laŭ la du novaj komitatanoj, estas du gravaĵoj, kiuj helpu al la estonta sukceso de nia junulara asocio. Ankaŭ Tim Owen forlasis la komitaton post pluraj diligent-laborantaj jaroj.

Michael Seaton, kiel kasisto, nun traktas la ŝanĝon de la JEB-a bank-konto al la "Co-operative"-banko, kiu pli taŭgas por niaj bezonoj kiel asocieto.

Provizore, la komitato decidas resti sendependa de la Esperanto-Asocio de Britio, sed ambaŭ asocioj kunlaboros por atingi komunajn celojn. Ni dankas al la direktantaro de EAB, kiu modifos sian membriĝilon por deklari ke ĉiuj junuloj kiuj membriĝos al EAB ankaŭ membriĝos al JEB, kaj rajtos peti ke siaj detaloj estu donata al ni.



Ĉiu membriĝo okazos ĉe la nova retpaĝaro (http://novajeb.org.uk), kaj rajtas membriĝi **senpage** junuloj, kiuj havas inter 16 kaj 30 jarojn, kiuj loĝas en Britio. La nova ĵurnaleto "S@luton" troveblos ĉe la nova retpaĝaro en PDF-formato, kaj Tom Shorney redaktos ĝin. Ĉiuj rajtas skribi artikolojn (angle aŭ esperante) por enmeti la ĵurnaleton.

Kelkaj komitatanoj okupiĝas sin pri la organizado de la Internacia Seminario (IS), novjara festo en Germanio, kaj intencas organizi karavanon al ĉi-tiu evento, por ke multaj JEBanoj partoprenu.

JEBanoj aliĝu la JEB-diskutliston kaj la novan forumon por konatiĝi kun unu la alia.

*La kompletaj "Minutes" aperas sur la nova retpaĝaro ĉe http://www.novajeb.org.uk/AGM2006.pdf*

# La Krokodiloj Ne Mordas!

Kiuj estas la plej malbonaj frazoj imageblaj? Ĉu iu ajn povus esti pli malbona ol "Mi bedaŭras. Ĉi tiu loteria bileto ja estas la venkanta … sed la datlimo por reklamacii la premion jam pasis"? Aŭ "VIA FILO MIAN FILINON GRAVEDIGIS~!" Se ne, imagu je la vekiĝo aŭdante "Bonan metenon!", la Morto, falĉilo enmane, salutante vin.

Sendube, ĉio ĉi *ja* estas naŭzaj aferoj aŭdi. Ili estas nenio, tamen, kiam oni komparas ilin kontraŭ du etaj vortoj kiuj ĝis ne limo enervas min: *Ne kroko-dilu*! *kraĉas*

Ne krokodilu. Ne estas la vortoj mem kiuj ĉagrenas min; ili estas nur elbuŝaĵoj. Tamen, la uzo de ili, plej ofte el la buŝo de iu sociala fuŝulo, nenian pozitivan motivon havas kaj, laŭ mi almenaŭ, nur ekzistas kiel maniero plipotencigi la kritikanton je la kosto de la riproĉetanto.

En Esperantujo, la verbo "krokodili" signifas ke du aŭ pli homoj parolas ne Esperante sed en sia nacilingvo. La origino de la verbo (kaj ĝia kuzoj *aligatori*, *kajmani*, *lacerti*, *gaviali*, kaj *reptilumi*) ankoraŭ ne estas konata.

Uzantoj de la frazo sentas liberaj interrompi iun ajn privatan konversacion laŭvole. Sen disputi, tiu ago estas ege malĝentila. Tio ne estas subjektive, tio estas vera fakto, kaj mi neniel vidas kiel oni kapablus provizi kontraŭaĵon.

Pripensu ĝin tiel; se mi stratpromenus kaj interrompus konversaciojn de aliaj homoj per la interjekcio "Tranĉu vian hararon!" aŭ "La ĝusta prononcio estas 'S-C-IAS' ne 'S-IAS'!", mi meritus ke oni kritikegu min.

Tamen en Esperantujo, tiuj stultuloj pasas la tutan tagon estante malĝentilaj. Kiam oni estas ekster la konstruaĵoj, ili, sen timo de puno, informas ke "Tio ne estas la ĉambro por fumi."



Nur por klarigi, la fumĉambro lastjare estis eteta … kaj ornamita per kranoj kaj aliaj simboloj de la morto. (Kaj ili demandas sin kial homoj fumas aliloke.) Mi eĉ memoras ke stultulo ĵetis sinkreitan "Ne fumu"-an afiŝon al mia vizaĝo. Kian ĉarman konduton. ~snarf~ Ne necesas tion diri, sed li kaj liaj samagaduloj malrapide lernas ke kelkaj Esperantistoj ne akceptas ilian malĝentilan kaj "timotigan" (inter "" ĉar tiaj sencerbuloj timigas tiom kiom la ideo ricevi senpagan monon) konduton sen reago. Kiel ĉiuj tiranoj, ili ne tro ŝatas la situacion kiam ĝi estas maligita.

Mi certas ke iuj diros al si "Pro kio vi iras al Esperanta evento se vi intencos paroli en la angla?" Al ili mi respondas tiel; mi neniam iras tien por paroli *nur* la anglan.

Iujfoje, tamen, kelkajn temojn oni ne kapablas taŭge diskuti escepte en sia nacilingvo. Ekzemple, mi ne bonvenus la ideon diskuti malsamajn teknikojn ludi la gitaron en Esperanto. Nek en la franca, fakte, kaj tiun mi flue parolas. En la angla, tamen … jes, senprobleme, ĉar en tiu lingvo mi jam konas la vortojn kiujn mi bezonos.

Malgraŭ mia malŝato, mi ne kapablas ne rideti pro la ironio de la situacio. Demandu al niaj troentuziasemaj geamikoj *kial* ili interrompas privatajn konversaciojn per "Ne krokodilu!" kaj vi ĉiam ricevos la saman respondon: por antaŭenigi Esperanton, kaj protekti ĝian estontecon. ~snarf~ Ĉu aliaj rimarkas la ironion tie? "antaŭenigi Esperanton?" Ha! Ŝajnas esti la malo laŭ mi. Legu plu por eltrovi kial …

**Mordu la ironio-kukon:**



Mi vojaĝis al pluraj kongresoj kaj eventoj kun amikoj kiuj sciemas pri Esperanto. Ili scias ke mi partoprenas kaj ke tio plaĉas al mi kiel hobio. Ili ŝatas miajn rakontojn, ili interesiĝas pri renkonti homojn el diversaj landoj kaj kulturoj, kaj ili volas gustprovi iom da Esperantujo. Ĉiam, la samaj maltrankvilaĵoj leviĝas: "Tim, mi dubas ke mi kapablos lerni lingvon." Eta konsilaĵo poste, kaj ili nun pretos iri, helpata de eta vokabulario sur kiu ili aldonos novajn vortojn estonte … tio estas, se iam ili revenos al Esperatujo. Kial ili tion devu fari post la interrompo de iu stulta "akuzativulo[1]" kiu ĉiam interjekcas iliajn konversaciojn per la kritiko "Ne krokodilu!" *kraĉas*

Mi memoras ke unufoje mi babiladis kun du anglaparolantaj amikoj ĉe la IJK en Pollando. Kontraŭe al la reputacio, tiuj Angloj ne pasis la tutan tempon nur apud aliaj Angloj. Ili bone intermiksiĝis kun homoj el aliaj landoj, sed nur parolante la anglan. Unu el ili eĉ estis kontribuanto al la vesperprogramo, ĉar li estis gitaristo en unu el la muzikgrupoj.

Laŭ vi, kara leganto, kion ili kredintus pri Esperantistoj kiam iu ratvizaĝa misnutrita sociale mallerta sandalportante stultulo piedpasis ilin paroletante "Kiu estas tiu stranga lingvo?" dum sinskuadi la kapon. (Estas vere ke je la elbuŝiĝo la angloj ne fakte *sciis* tion kion li diris, sed ili baldaŭ eltrovis.) Nia ĉarmanta amiko verŝajne ne konsciis ke Rolf kaj mi, nu, havas iometon da komprenpovo en Esperanto. Li ricevis kelkajn elektitajn vortojn reage kaj tuj (kia surprizo) malkuraĝiĝis. Nu, li ne rajtas plendi … ili ja estis en Esperanto! Miaj amikoj nun ĉiuj konas tiujn vortojn por kiam tio sendube (malfeliĉe) okazos denove estontece.

Aĉ, la vorton "krokodili" laŭ tiu kunteksto ekde ĉiam Esperantistoj uzas kiel ilo por riproĉi aliajn. Rakontetoj de la 1930-oj ekzistas pri taksiiston nomita Ferrari. Li kaj liaj samideanoj renkontiĝis ofte en kafejo. Kiam ne-Esperantistoj eniris la kafejon babilante en la franca, Ferrari ofte rikanis "Kion volas *tiuj* krokodiloj?"

Mi memoras kiam mi ekparolis Esperanton. Kvar monatojn antaŭe, mi komencis la lernadon kaj pretis provi paroli ĝin. Mi vojaĝis al Barlastono por semajnfina kurso. Je la unua vespero, mi renkontis ĉarmajn geedzojn nomitaj David kaj Jean Bisset, kiuj invitis min sidi apud ili kiam la manĝhoro alvenis. Mi dankeme akceptis ilian ĝentilan oferon kaj ekrespondis al iliaj demandoj … en la *itala*. La konversacio mortintus tuj se ili ne kuraĝigus min kaj permesus al mi respondi al siaj Esperantaj demandoj en la angla. Mi vere valortaksis ilian ĝentilsignon kaj, iom poste, iris al la Brita Kongreso en Glasgovo.

Nu, pensu pri tio. Kio okazintus se ili elektus agi laŭ la ""Ne krokodilu!"-a maniero? Tio; diligenta juna komencanto sentintus ekskludiĝita, estintus malfeliĉa, kaj forĵetintus ian ajn intencon daŭrigi Esperanton, riproĉante ĉiujn Esperantistoj kiel malĝentilaj, malbonvenemaj stultuloj. Interesinde, ĉu ne? Estas la homoj kiuj permesis al la nova alveninto paroli sian propran lingvon kiuj sukcese kreskis aktivan Esperantiston. La "Ne krokodilu!"-aj ekstremistoj, tamen … ha! Kiel ĉiuj ekstremistoj, ili sukcesas turni homojn for de siaj kredoj.

Moralaĵo: Ne timu krokodilojn kaj estu ĝentilaj al homoj. Ĉiuj pliboniĝos pro tio.

*Tim Owen*

1: *Akuzativulo*: Esperanta slango por freŝa kaj avida komencinto kiu envenas plena de ideoj plibonigi la lingvon, sed kies argumentoj suferas pro tuta manko de akuzativo

# Esperanto: la plej bona solvo?

Kvankam mi kapablas komprenigi min al aliaj Esperante, mi ne priskribas min kiel Esperantisto. Tio tute estas nur opinio mia, sed mi dirus ke Esperantisto estas ne nur iu kiu parolas Esperanton, sed ankaŭ iu kiu aktiviĝas en la Esperantuja sceno. Estas malsameco inter paroli kelkajn vortojn Esperante kaj akcepti ĝin kiel viva filosofio, aliĝante al la multeco da kluboj kaj asocioj kiuj ekzistas kaj vojaĝante tra la tuta mondo al diversaj kongresoj kaj eventoj.

Mia nivelo en Esperanto ne estas la plej bona. Per tio, mi volas diri ke mi ankoraŭ ne legis libron en Esperanto, ekzemple, kaj mi ne kapablas skribi pli ol kelkaj paragrafoj sen erari. Tamen, **mi pli bone esprimiĝas en Esperanto ol en la franca**, lingvo en kiu mi notis A* kiam mi studis ĝin por miaj GCSE-aj ekzamenoj. Se mi irus Francion, mi kapablus peti tason da kafo kaj rezervi hotelĉambron. Mi sukcesus sufiĉe flue paroli pri mia lerneja uniformo, se iam iu ajn pretus aŭskulti! Sed neniel mi kapablus komuniki sen heziti pri miaj opinioj pri religio, politiko, kaj literaturo.

En Esperanto, mi kapablas paroli pri la vivo, la universo, ĉio; ne perfekte, sed sufiĉe bone ke oni komprenu min kaj por plenumi indajn diskutojn kun homoj kiuj parolas neniom da la angla. Tio signifas por mi, ke Esperanto estas tre potenca ilo.

Ho, jen la averto! La intenco de ĉi tiu retpaĝaro ne estis propagandi Esperanton. La intenco de ĉi tiu retpaĝaro estas defiigi homojn kiuj eble ne tro interesiĝas pri lingvoj retaksi siajn vidpunktojn kaj opiniojn. La celo de la Esperantaj paĝoj estas mallonge klarigi la koncepton kaj avantaĵojn de Esperanto al homoj kiuj eĉ ne scias ke ĝi ekzistas. Ebletas ke ĉi tiu retpaĝaro instigus iun pli profunde esplori Esperanton, kazo ke ĝojegus min. Se vere vi interesiĝas, sentu libera sendi retmesaĝon al mi kaj mi gvidos vin direkte al iuj el la plej bonaj interretaj rimedoj aŭ helpi al vi kontakti verajn Esperantistojn. Mi ne intencis, tamen, etikedigi Esperanton la pli potenca kaj unika solvo. Estas unu ebla solvo al tre komplika problemo. La lernado de Esperanto eble prezentus al vi tutan mondon de eblecoj. Kontraŭe, povus esti ke ĝi ne plaĉas al vi. Se tio estas la kazo, mi defias vin serĉi kaj trovi iun kiu al vi plaĉas. Se vi ŝatas feriumi sube de la suno, kial ne provi lerni la hispanan, la italan, aŭ la grekan? Tiel, laŭ via propra maniero, vi povus asisti ekvilibrigi la lingvajn pesilojn, kiuj nuntempe troviĝas malĝuste pesigitaj al la avantaĝo de la angla-parolanta mondo!

*Clare Hunter*

*Tradukisto: Tim Owen*

*Prenita de la retpaĝaro: http://doyouspeakenglish.mywap.o2.co.uk*

Aliĝu al nia disuktlisto ĉe http://groups.yahoo.com/group/jeb-diskuto

# ESPERANTO en via regiono...

Ekde la unuaj homoj en Britio eklernis Esperanton, la kerno de la movado ĉiam konsistis de la lokaj grupoj da Esperantistoj kaj la regionaj federacioj, kiuj ne ĉesis esti fundamente graveca pro ilia persista montrado de subteno por la lingvo ĉe primara nivelo.




Kluboj kaj societoj aktiviĝadas en ĉiu angulo de la lando, el kiuj, iuj estas la idoj de grupoj komencitaj antaŭ jarcento. Estas mia plenkora opinio, ke kiel JEBanoj, ni devu esti ĉe la fronto de ajna loka Esperanista agado kaj ni ja strebu alporti nian energion kaj entuziasmon al la publikado de Esperanto kun aliaj junuloj, en niaj respektivaj mondpartoj. Al mi, ŝajnas tute klare ke la respondeco estas nia certigi ke grupoj kaj federacioj ĉiam havas konstantan enfluon da novaj membroj, ĉar ili ne estas nur grava tradicio, sed nekontesteble esencaj por sekurigi Esperanton estonece.

Estas grupo da Esperantistoj kiu kunvenas ĉiumonate ne tro for de mi, kiun mi vizitadas ekde preskaŭ jaro. La frekventado helpis min multe povi praktiki la lingvon kun aliaj homoj ĉar, malgraŭ ĉion, kiun faris la interreto por promocii Esperanton, ĝi vere ne estas virtuala lingvo, sed fakte ĝi estas brila vivanta lingvo kun sia propra kulturo kaj historio. Nuntempe, ni diskutas kion ni faru ĉi somere por plibonigi la videblecon de la grupo kaj la kampanjon en nia ĉirkaŭa loko.

Krom la okazaĵo de povi ekkoni ĉiujn la aliajn Esperantistojn en via regiono, kutime eblas aĉeti librojn kaj diversajn aĵojn por helpi vin kaj vian lernadon ĉe federaciaj kunvenoj, kiuj pasiĝas nur unu-du fojojn jare. Estas tiom bonega renkontiĝi kun aliaj samideanoj, sed la vera beleco de Esperanto estas ke ĝi kontaktigas vin al homoj kiuj interesiĝas pri aferoj, kiujn vi ne scius ekzistas.

La praktikado de la lingvo helpos al vi, kaj eble kuraĝigos vin partopreni en iuj de la mirindaj eventoj, kiuj okazas ĉiu-jare en nia lando kaj ekstere. Vi certe ne riskus ion ajn , se vi irus vidi ĉu ili taŭgas por vi.

Kontaktu EAB por detaloj pri via plejproksima Esperanto-grupo je eab@esperanto-gb.org.

*Daniel White*

*Ĉu vi estas membro de Esperanto-grupo en via regiono?*
*Bonvolu kontakti nin pri viaj spertoj de lokaj grupoj.*

*Se vi serĉas Esperanto-grupojn britajn, trovu liston ĉe la EAB-retpaĝaro:*
*http://www.esperanto-gb.org/eab/member.htm*

# Ĉu interesus al vi ĉeesti **Muzikfestivalojn** en 2007 **senpage**?

Venontsomere ni intencas plivastigi la amplekson de la publikigo de Esperanto kun junuloj, per la stari-gado de novaj informejoj ĉe alternativaj muzikfesti-valoj. Tiel ni povos transdoni informaĵojn pri la inter-nacia lingvo al juna aŭdantaro, kiu dividas similajn ideolojn pri interkompreno kaj homaranismo.

Ni serĉas ardajn volontulojn por regi la standon, kiuj povus alporti iom da entuziasmo kiam ili parolas al festivalanoj kaj eble eĉ partopreni en demonstroj pri la facileco kaj utileco de Esperanto por engaĝi la publikon.

La organizanto de ĉi-tiu projekto, Eric Walker, komi-tatano de EAB, volus vidi informejoj ĉe unu aŭ pli el tiuj eventoj:

**- WOMAD - World of Music and Dance, 27-28 julio 2007** Internacia festivalo kun muzikistoj el ĉirkaŭ la mondo.

**- The Big Green Gathering, aŭgusto 2007** La verda alternativo al Glastonbury; 5-taga kampada evento, kiu inkluzivas ĉiun flankon de la naturamika vidstilo, muziko kaj scio. *Eble samtempe kiel IJK en Vjetnamo*

**- Greenbelt Fesival, 24-27 aŭgusto 2007** Sub-foseta kristana junulara renkontiĝego, kun multego da internacia justeca sento.

Eric deziras fari proponon pri la agado, kiun li donos al la EAB-komitato. Nuntempe, li laboras kun la cif-ero de ĉirkaŭ 3 volontuloj, por kiuj li petus ke EAB pagu por la eniroj al unu festivalo kaj aliaj kostetoj. Se pluraj junuloj partprenus, ni havus pli da lib-ertempo por ĝui la bonegajn festivalojn kaj ankaŭ ni verŝajne povus publikigi Esperanton per pli interesaj manieroj. Tiuokaze, la volontuloj kompreneble de-vus kontribui pli al la kosto ĉar EAB ne povus fi-nanci ĉion sed tiam ni havus jam etan esperantistan renkontiĝon.

Se vi interesiĝas pri partopreni en tiu afero, bv kon-takti Eric kaj diru al li, kiuj festivaloj vi estus dis-ponebla por ĉeesti, viaj kontaktdetaloj kaj via naskiĝdato, tiel rapide kiel ebla je ericwalker@gn.apc.org

# Want to learn **Esperanto**? Try the **FREE POSTAL COURSE**!

More and more young people are getting involved in Esperanto through the internet. The trend nowa-days is to learn Esperanto through sites like *Lernu.net,* but if you're looking for something a bit more tangible to help you progress with your learning, you should look no further than the *Free Postal Course* run by EAB. This 12-lesson course is a good introduction to Esperanto. Each lesson is self-contained and teaches grammatical points by example and lists vocabulary needed for the translation excercises. You are appointed a tutor, to whom you send your completed lessons with a SAE. Your tutor will send you back corrections and the next lesson in the course; you can take as long as you need to complete the course. You will receive 2 Esperanto postcards, a small story booklet *"La Junaj Trezorserĉantoj"* and other useful leaflets. After you are sent your finisher's certificate you will be entitled to enrole for the Course-you-Can course held in Esperanto House, Barlaston in October for a discounted rate. You can download the first lesson from a link at http://www.esperantoeducation.com/freepostal.html

# Nova Retpaĝaro por JEB

Se vi ankoraŭ ne membriĝis al JEB, vi povas aliĝi **senpage** ĉe la nova retpaĝaro! Vi rajtas membriĝi se vi estas 16-30 jaraĝa kaj loĝas en Britio. Vi trovos ankaŭ informaĵojn pri esperantaj eventoj en kaj Britio kaj Esperantio, kaj konsilon pri kiel plibonigi vian kapablon en la lingvo. Ĉiuj eldonoj de *S@luton!* troveblos ĉe la retpaĝaro, kun pli da detaloj kaj bildoj de freŝdataj eventoj. JEBanoj rajtas aliĝi al la Yahoo! JEB-Diskuto kaj baldaŭ la nova forumo, kie oni povos babili kun aliaj membroj pri iuj temoj.

Ĉu vi havas esperantan retpaĝaron aŭ blogon? Se jes, bonvolu kontakti nin retpoŝte al saluton@novajeb.org.uk kaj ni eble mencios ĝin en la venonta numero de *S@luton*!

www.novajeb.org.uk

***La Amikeco*** estas internacia retgazeto por junaj Esperantistoj tutmondaj, kiu naskiĝis ĉe renkontiĝo de E-junuloj el Japanio, Koreio kaj Vjetnamio en Hanojo. La gazeto enhavas multajn interesajn artikolojn de verkistoj el diversaj landoj. Ĉiam bonvenas novaj verkistoj.

*Vizitu www.la-amikeco.net por legi kaj kontribui artikolojn!*




Komprenu kulturojn de la mondo pere de Esperanto, kaj fariĝu la ĉefrolulo faranta mondpacon!

*Bildo montrata konsente de **La Amikeco***

## 62-a Internacia Junulara Kongreso

*6-a ĝis 13-a aŭg 2006 - Sarajevo, Bosnijo kaj Hercegovino*

Ĉiu-jare kunvenas junaj Esperantistoj el la tuta mondo. Sarajevo bonvenigos vin ĉi-somere kaj oferas plenan programon. Amikiĝu kaj sentu en Esperantio ĉe ĉi-tiu evento, en kiu vi nepre devas partopreni!

*Musklaku ĉi-tie por viziti la oficialan retpaĝaron de la IJK!*

# JRI | Junula Radio Internacia

*Junula Radio Internacia* (JRI) estas podkasta radio, kiu faras elsendojn cele al junaj Esperantistoj (sed ankaŭ por aliaj Esperantistoj). Tri junaj Esperantistoj el diversaj landoj faras intervjuojn kaj prezentas la elsendojn: *La Pingvino* el Nederlando, Aleks Raymond el Francio, kaj Luis Miguel el Peruo.

http://junularadiointernacia.eu.tt

"Per *Junula Radio Internacia* ni provas doni al la Esperanta mondo novan rimedon por povi ĉion diri kion oni volas," diras La Pingvino, estro de *JRI*.

## Course-you-Can!

Organised specifically to help beginners and post beginners to read, write and speak Esperanto, the course takes place in October at Esperanto House near Stoke. It is a great way to immerse yourself in an entirely Esperanto-speaking environment. It would be really great if we could arrange a JEB contingent to participate, inclusive of all levels of ability, as a chance for newcomers and not so new members to meet one another, and for us to discuss how things are going with the association. For various reasons, not everyone is able to take part in the big Esperanto events abroad, so we should aim to have more of a presence here in the UK. Accommodation and meals are already organised with the course, and you will have access to facilities such as the Butler Library and the EAB shop. Those that have completed the Free Postal Course are eligible to take part at a discounted rate.

Contact EAB to sign up.

## EVENTOJ 2006

**6-13 aŭgusto 2006**
**- Internacia Junulara Kongreso,** Sarajevo, Bosnio-Hercogovino.

**12-18 aŭgusto 2006**
**- Somera Festivalo**, Barlaston, Britio.
Semajno kun longaj kaj mallongaj kursoj kaj agadoj je diversaj niveloj por post-komencantoj aŭ fluaj-parolantoj de Esperanto. Vespera programo ankaŭ.

**22-27 aŭgusto 2006 – Festo**, Kastelo Grezijono, Baugé, Francio.
"La programo simple estas senĉesa festo." Inkluzivos interalie koncertojn, Eurokka laboras kun *Espéranto-Jeunes* por krei agrablan muzikprogramon.

**20-22 oktobro 2006**
**- Course-you-Can!**, Barlaston, Britio.
Semajnfina kurso por komencantoj kaj progresantoj, kiu helpos al vi legi, skribi kaj paroli Esperanton.

**27 dec 2006 - jan 2007**
**- Internacia Seminario**, Germanio.
Silvestra festo, daŭrante semajnon, okazas en malsama urbo en Germanio ĉiujare. JEB planas organizi karavanon al kongresejo per aŭto por britaj partoprenantoj.

***S@luton*** - *La Ĵurnaleto de la Junularo Esperantista Brita* | Redaktoro: Tom Shorney | Pruvleganto: Tim Owen
**JEB Komitato:** Petra Fantom (Prezidanto) / Rolf Fantom (Sekretario) / Michael Seaton (Kasisto)
Hannah Tellier / Tom Shorney / Daniel White